








# Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2020

### La Estraro de UEA en majo 2021:


- Duncan Charters (Prezidanto)
- Fernando Maia Jr. (1-a Vicprezidanto)
- Trezoro Huang Yinbao (2-a Vicprezidanto)
- Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario)
- Amri Wandel
- Jérémie Sabiyumva
- Orlando Raola
- So Jinsu
- Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

En la junia numero de la revuo *Esperanto* aperas la jara raporto de la Estraro de UEA. Se vi deziras legi pli da detaloj, estas aliaj raportoj tra la jaro, troveblaj ĉiuj en la retejo de UEA: *https://uea.org/teko/komitato*.

## Enkonduko

La jaron 2020 ni memoros kiel la unuan jaron de la pandemio de KOVIM-19. Pro ĝi estis nuligitaj la Malferma Tago (MT), la 105-a Universala Kongreso (UK) kaj pluraj aliaj eventoj. Tio povus esti senteble malhelpinta la vivon de Esperantujo, tamen danke al la internacia esperantista kunlaboremo eblis signife venki la diversajn malfacilaĵojn. Simbolo de tio estis la elpensado kaj okazigo de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) kaj de la Virtuala Kongreso (VK), lige kun kiuj UEA intense agadis pri la 75-jariĝo de UN. Inter elstaraj atingoj estis: salutparolado al MondaFest' de

F. Hochschild, tiam Vica Ĝenerala Sekretario de UN; salutmesaĝo al VK de V. Plante, urbestrino de Montrealo; revivigo de UEAviva ĉe YouTube; estiĝo de Fonduso Instigo-Liberapay; kaj la internacia Esperanto-kurso por hispanparolantoj. En 2020 UEA ankaŭ gastigis la Jaron Hodler, kiam la Asocio fariĝis 112-jara kaj per la vasta subteno de esperantistoj daŭrigis sian mesaĝon de kuraĝo kaj espero.




## Agadkampo 1: Konsciigo

### Informado:

Informado varie okazis, lige kun aliaj laborkampoj. La laborgrupo pri Informado produktis kaj disvastigis plurlingve afiŝojn pri la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo. Fine de marto, subtenate de ILEI, UEA diskonigis la iniciaton "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo". UEA decidis kolekti donacojn por informado dum la rokmuzika festivalo Pol'and'rock (planita por aŭgusto, sed nuligita). UEA sponsoris la eventon Poliglota Renkontiĝo (*Polyglot Gathering*), organizita de E@I, okazinta rete en majo, kun prelego de R. Maertens pri Esperanto kaj UN, krom kursoj kaj lingvo-praktikado. UEA ankaŭ partneris kun la Poliglota Konferenco (okazinta rete en oktobro), proponante Esperanto-kursojn gvidatajn de E-Asocio de Britio (A1-A2) kaj *Edukado.net* (B1-B2). Plej elstaris en 2020 la Esperanto-kurso por hispanparolantoj, de la Amerika Komisiono, gvidita de Kolombia E-Ligo kunlabore kun UEA kaj TEJO, lanĉita en junio kadre de MondaFest'. Ĝi daŭris du monatojn, kun pli ol 320 sesioj gvidataj de ĉirkaŭ 30 volontulaj instruistoj. Partoprenis 536 lernantoj, el kiuj 230 ricevis atestilojn.

Krom tio, daŭre aktivis la grupo Zorgantoj pri Informado (ZPI), kun R. Corsetti, E. Cid, L. Obando, Chen Ji kaj So Jinsu, estrarano de UEA pri Informado. Ĝi okupiĝis pri laboroj de informpetado, informkampanjoj al neesperantistoj kaj pretigo de informmaterialoj. Elstara atingo estis la "Retinario", kunlabore kun Irana E-Asocio (IrEA), por prezentadoj de Esperanto al neesperantistaj universitatanoj.

### Eksteraj Rilatoj:


Frue en la pandemio oni decidis, ke plimulto de la UN-oficistoj laboros dehejme kaj fermis la sekretariatan domon en Novjorko. Sekve neformalaj kontaktoj inter oficistoj kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj (NRO-oj), esenca elemento de eksteraj rilatoj, ne povis okazi, kiel same la rilatoj inter NRO-oj kaj naciaj misioj. Normalaj kunsidoj de NRO-komitatoj ĉesis okazi. Kelkaj NRO-komitatoj klopodis daŭrigi virtuale, sed la komitato en kiu UEA ĉefe aktivas, nome tiu pri Edukado, ne okazigis virtualajn kunsidojn. Rilatoj kun la Konferenco de Neregistaraj Organizoj (CoNGO) en konsultaj rilatoj kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (Ekosok), ĉefa ligo inter UN kaj NRO-oj, estis same interrompitaj, sed la Estraro de CoNGO (en kiu UEA membras) sukcesis renkontiĝi virtuale. H. Tonkin, komisiito pri Rilatoj kun UN kaj en 2020 akceptita de la Komitato de UEA kiel Honora Prezidanto de la Asocio, restis en proksima kontakto kun la prezidanto de CoNGO, sed nesukcesa estis interkonsento kun CoNGO pri kuna dungo de staĝanto en Novjorko por helpi ambaŭ organizojn, ĉar fermiĝo de la UN-domo esence faris lian laboron neplenumebla. UEA kaj TEJO ankaŭ faris interkonsenton pri helpo de komuna dungito de UEA kaj TEJO, S. Papadatos, rekte en la UN-laboro, sed ankaŭ tio montriĝis malfacile plenumebla, malgraŭ klopodoj. Tamen unu el la pozitivaj efikoj de la laboro en CoNGO estas tio, ke CoNGO komencis aperigi ĉe sia retejo ĉefajn dokumentojn en Esperanto-traduko. Fine, pere de CoNGO, UEA proponis kreon de NRO-Komitato pri Lingvo kaj Lingvoj. Ja konstanta plendo de UEA kaj fakuloj pri lingva politiko estas manko de atento pri la lingva dimensio de la laboro de UN. Tial, se la propono sukcesos, temos pri signifa antaŭenpaŝo, ĉar estas pli facile konvinki misiojn ĉe UN aŭ funkciulojn de UN aperi ĉe tiaj komitatoj ol klopodi por fari tion ekster la formalaj strukturoj. Ĝi ankaŭ faciligos levadon de lingvaj demandoj en la sino de UN. La Studogrupo pri Lingvoj kaj UN, kiun kunlaborantoj de UEA tenas neformale, fariĝus kerno de la proponata komitato. Tiu grupo ĉiujare organizas simpozion pri la temo, sed tio ne okazis en 2020.




Ampleksa estis la agado ĉirkaŭ la temo "UN 75-jara: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo" de la neokazinta 105-a UK, kiu pro tio estis transmetita al la trimonata MondaFest', dum kiu laborgrupo por la temo, subtene de la Vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri Eksteraj Rilatoj, F. Maia Jr., sukcese organizis plurajn aranĝojn (diskutojn, prelegojn, podiajn prezentojn k.s). Pro tio UN sendis specialan videosaluton fare de F. Hochschild, kaj Esperanto estis inter la lingvoj uzataj en UN-enketo okaze de la 75-jariĝo. UEA ankaŭ informis al UN pri okazigo de la virtuala ekspozicio "Hiroŝimo-Nagasako: 75 jaroj por paco", kun du salonoj, "Memore" kaj "Klerige", kunlabore kun M. Lipari, M. Grosjean kaj Osioka Taeko.




Unu el la flankaj produktoj de MondaFest' estis la *Gvidilo pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo* sub redakto de R. Maertens kaj H. Tonkin, enhavanta 17 ĉapitrojn pri la 17 CDE-oj, verkitaj de entute 17 esperantistaj fakuloj. Ĝi troveblas en la retejo *EsperantoporUN.org* kaj libroforme ĉe la eldonejo Mondial.




Meze de 2020 UEA oficialigis la retejon UN Esperante (*unesperante.wordpress.com/*), zorge tenata de R. Lima kun spacoj ankaŭ en Tvitero kaj aliaj sociaj retoj. Fine de 2020 S. Spanò, eksestrarano de UEA kaj komisiito pri Eksteraj Rilatoj, akceptis kunordigi la UN-laborojn en la diversaj centroj (Novjorko, Vieno, Ĝenevo, certagrade Parizo), kunlabore kun H. Tonkin, S. Keller, H-M. Maitzen kaj F. Lo Jacomo. U. Becker kaj S. Soskina daŭre prizorgas dissendon de la informilo de Esperanto por UN. F. Lo Jacomo, aldone al sia laboro ĉe Unesko, tradukas ĝin en la francan. UEA daŭre havas oficejon en Novjorko, apud UN, sed dum la pandemio ĝi ne povis funkcii. R. Corsetti, de ZPI, plene aniĝis al la laboroj de Eksteraj Rilatoj, kun granda subteno al diskonigo de informoj. Dum la jaro aperis 80 Gazetaraj Komunikoj, videb-




laj en la retejo de UEA. El ili ĉ. dudek estis pri UN-tagoj aŭ rilataj al Unesko.

Pri Unesko UEA laŭpete pretigis por ĝi tekston pri la rilatoj inter Unesko kaj Esperanto. El tio Unesko-funkciuloj pli bone ekkonis la valoron de Esperanto. UEA eldonis Unesko-libron en Esperanto kune kun versio en la ĉina, *De ideoj al agoj, 70 jaroj de Unesko*, pri kio oficistoj el Unesko kaj 20 esperantistoj el 7 landoj kontribuis. La Festivalo por Paco, planita por la lasta jartriono de 2020 kaj por kiu UEA laboris por prezento de korusoj partoprene de esperantistoj, ne povis okazi. Anstataŭe, dum la Internacia Konferenco de NRO-oj ĉe Unesko, oni rete prezentis filmon konsistantan el varbitaj videoj. Kelkaj videoj el ĉirkaŭ 60 korusoj varbitaj de esperantistoj estis kunmetitaj. Plimulto el ili estis varbitaj per esperantistoj tra la mondo.

En 2020 alprenis eldonadon de la E-versio de la revuo *Unesko-Kuriero* El Popola Ĉinio (EPĈ, China Report Press). UEA daŭre kontribuis per sia tradukteamo por tradukado kaj reviziado. Aperis 3 numeroj en 2020, kiujn oni daŭre povas elŝuti el la retejo de UEA. En sia parolado dum la ceremonio de subskribo de kontrakto inter EPĈ kaj Unesko por la nova fazo de la E-versio la Unesko-oficisto Ian Denison alte aprezis la valoron de Esperanto kaj laŭdis la Asocion kaj la iniciatinton kaj eksredaktoron de la E-versio, Trezoro, nuntempe duan Vicprezidanton de UEA kaj estraranon pri Unesko.

Reprezentantoj de UEA, ILEI kaj TEJO (F. Lo Jacomo, B. Despiney, D. Loison, R. Triolle, M. Arnaud kaj H. Becklin) parte aŭ plene ĉeestis virtuale la konferencon de la Ligkomitato ĉe Unesko en decembro. UEA kiel kandidato al komitatana posteno en la Ligkomitato prezentis sin videe kaj tekste kaj aperis sur la listo de kandidatoj, sed finfine ne estis elektita.

UEA ankaŭ tradukis la infanlibron *Vi estas mia heroo: kiel infanoj povas batali kontraŭ KOVIM-19!*, originalan projekton de la Konsulta Teamo de Inter-Agenteja Komitato pri Mensa Sano kaj Psikologia Subteno – Konsila Grupo en Kriza Situacio (IASC MHPSS RG) de UN. Ĉina E-Ligo eldonis ĝin kiel bitlibron, disponeblan kune kun ali-




aj versioj en 130 lingvoj ĉe la retejo de IASC. UEA produktis la sonlibron, disponeblan en UEAviva. Laŭ la projektoj "Disvastigi la idealojn kaj valorojn de Unesko per Esperanto" kaj "Nacilingva reklamo al la publiko", Trezoro disvastigis tekste, bilde kaj/aŭ videe diversajn informojn pri Unesko kaj Esperanto, sur sociaj reklamaj amaskomunikiloj. Ĝis la fino de 2020 ĉinlingva reklamo al la publiko estis legita aŭ spektita 70 milionojn da fojoj kaj akiris 130 000 ŝatantojn kaj ĉirkaŭ 88 000 laŭdojn en Ĉinio.

## Agadkampo 2: Kapabligo

**Instruado kaj Rilatoj kun ILEI:** Dum aprilo-decembro la Prezidanto de UEA, D. Charters, regule konsiliĝis kun la prezidanto de ILEI, M. Grosjean, pri aferoj de reciproka intereso, inkluzive kunordigon de kongresoj kaj kunsidoj. Charters partoprenis en la 53-a kongreso de ILEI, okazinta kadre de MondaFest', sub la nomo Virtuala Esperanto-Konferenco de ILEI (VEKI). UEA plu subvenciis al ILEI kaj sponsoris VEKI. Charters ankaŭ partoprenis en aliaj klerigaj aranĝoj, inkluzive la januaran kurson de la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda E-asocioj, gvidis superan kurson kadre de NASK pri la historio de Esperanto, ankaŭ okazinta kadre de MondaFest', kaj verkis pri Interkultura Kompetento por la prezentota Strategia Plano.

***Edukado.net:*** Kunlaboraj rilatoj daŭris pri aferoj de reciproka intereso inter **Edukado.net**, gvidata de K. Kováts, ILEI kaj UEA, kun elstara partopreno de *Edukado.net* dum MondaFest'. Grava rezulto de kunlaborado de fakuloj dum kelkaj jaroj estis la publikigo sub ĉefredaktado de K. Kováts de la novigita *Manlibro pri Instruado de Esperanto*, tro-

vebla ĉe *manlibro.ikso.net*, fare de ILEI, E@I kaj *Edukado.net*. En 2020 la Estraro de UEA starigis konstantan jaran subvencion de UEA al *Edukado.net*.

**Universitata Agado:** Kune kun IrEA, TEJO, ILEI kaj ESF laborgrupo pri universitatoj aktive ekkunsidis virtuale por esplori la demandon pri universitata agado, enkondukon de Esperanto en universitatojn kaj ĝian utiligon kiel esplorrimedo. Grandan parton de tiuj diskutoj eblas spekti ĉe UEAviva. Elstaraj atingoj estis ĉiumonataj kunsidoj por kunpensigado, kiuj parte okazis kiel eroj de MondaFest', kaj la "Retinario", partnere kun la laborgrupo pri Informado. Daŭre funkciis la katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, gvidata de D-ro F. Gobbo. UEA kunlaboris kun la Esperanto-rilata post-diplomiĝa programo de la Universitato de St. Andrews (Skotlando) pere de la junulino kaj doktoriĝanto M. Burghelea, i.a. per membrigo de esploristoj (profesoro kaj studentoj) kaj intertraktado, kunlabore kun BEL, inter brazila TV-entrepreno kaj la lernej-bieno Bona Espero (BE), por disponigo de filmo pri BE, subtekstigita en la angla por la studentoj.


**Esploro kaj Dokumentado:** En aŭgusto 2020 H. Tonkin, direktoro de CED dum pli ol kvar jardekoj, transdonis la gvidan postenon al M. Fettes. CED reorganiziĝis, nun konsistanta el konsilantaro kaj estraro. Esperantologia Konferenco ne okazis.

**Aktivula Trejnado:** La programo Aktivula Maturigo (AMO) diris *kia ora* ("bonvenon" en la maoria lingvo) al la eventoplena jaro. AMO62 okazis en Aŭklando, la plej granda urbo de Nov-Zelando, kadre de la komuna kongreso inter Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kiel la sola fizika AMO-seminario de 2020. La naŭ sekvaj seminarioj (63-71) okazis rete. Tiuj kun ligo al urbo aŭ lando okazis en Teherano (Irano), Modra Harmonia (Slovakio), Greziljono (Francio), Oslo (Norvegio), Vroclavo (Pollando) kaj Pekino (Ĉinio). Temoj gamis tra Faka kaj Landa agadoj, rejunigo de la eŭropa movado, Skandinavio, Ĉinio, E-centroj kaj la rolo de instruistoj. Detaloj aperas, kiel ĉiam, en la januara numero de la revuo *Esperanto* (RE) kaj ĉe la retejo de UEA *Aktivulo.net*. Reta enhavo disponiĝas ĉe UEAviva.

## Agadkampo 3: Komunumo

Dum la VK la Komitato akceptis H. Tonkin kiel Honoran Prezidanton de UEA kaj Zlatko Tišljar (kiu bedaŭrinde forpasis en septembro) kiel Honoran Membron. Dum la VK ankaŭ 14 elstaraj agantoj estis diplomitaj. La Premio 2020 de Fondaĵo Antoni Grabowski estis aljuĝita al Bertilo Wennergren. En la 19-a de septembro, la 100-a naskiĝtago de E. Vivancos, UEA starigis la Tagon de Veteranoj, kun speciala prelego pri lia vivo. En 2020 UEA ankaŭ subtenis la eventon Paralela Universo kadre de MondaFest'. Kun subteno de E. Cid kaj R. Corsetti, la Ĝenerala Sekretario de UEA, A. Kadar, starigis novan retliston *UEA-membroj* ĉe *Groups.io* (pro neplufunkciado de diskutgrupoj ĉe Yahoo). Fondaĵo Espero helpis samideanojn en Afriko kaj Eŭropo.

**Malfermaj Tagoj:** La 52-a Malferma Tago okazis virtuale kun koncerto de Kjara, kun ĉ. 140 partoprenantoj. Raporto aperis en *UEA.facila.org*. Lige kun ĝi estis la enretigo en UEAviva de la DVD *Vizito al la Centra Oficejo* (CO). Ne okazis novembre Malferma Tago.




**105-a UK, Montrealo, Kanado:** Aliĝis 917 ĝis la fermo de la aliĝilo. La Estraro ekorganizis la konkurson "Partoprenu UK-on", sed ne povis daŭrigi. Pro la pandemio la 105-a UK prokrastiĝis al 2022 kiel 107-a UK. Anstataŭe okazis la trimonata **MondaFest'** (20-a de junio ĝis 20-a de septembro) kaj la **VK**, kiun partoprenis 1860 personoj, kun aliĝo de 2006 homoj el 97




landoj (ĝis fermo de la platformo). LKK de Montrealo enorme laboris por kompensi la nuligon de la UK per enhavo al MondaFest' kaj VK, inkluzive per starigo de la reta Kanada Kinejo. Kerna parto de la VK, inkluzive de cent programeroj, kiel "Klerige", sub kunordigo de C. Nourmont, estis registrita kaj videblas en UEAviva, kun re-




suma tabelo kaj listo de programeroj. La emblemon de MondaFest' dezajnis kadre de konkurso Joŝito Haŝimoto "Bonulo". La emblemo de la VK estiĝis kiel ideo de D. Campo. La *Festivalan Kurieron* (20 numerojn) redaktis D. Ŝevĉenko kaj A. Striganova. Fine de MondaFest' UEA lanĉis la kampanjon por Tutmonda Arbo-Plantado. La Estraro decidis pri la kongresa temo, "Paco kaj konfido: universalaj valoroj", kaj pri la emblemo de la **106-a UK, Belfasto, Nord-Irlando**. Jarfine la Estraro decidis, ke en 2023 la **108-a UK** okazos en Torino, Nord-okcidenta Italio.

**Landa kaj regiona agado:** En 2020 UEA kalkulis je 71 Landaj Asocioj (LA): 8 en Afriko, 12 en Ameriko, 14 en Azio-Oceanio, 37 en Eŭropo. Aparte grava al la regiona agado estis la Regionaj Tagoj, okazintaj dum MondaFest', anstataŭe al la kunsidoj de la regionaj komisionoj de UEA, kiuj okazus dum la UK. La nova formato, de reta evento tut-taga, montriĝis tre

bona al movadanoj. La komisiito de UEA pri Landa Agado, S. MacGill, organizis kaj aktualigis la dokumentojn *Landa Parad'* ĉe *Aktivulo.net*.

### Ameriko

UEA kunlaboris kun la "Interŝanĝa Programo por Elstaraj Junaj Gvidantoj" de Brazila E-Ligo (BEL) faciligante la laborojn de du junaj brazilanoj dum esplorvojaĝo (novembro 2019 – februaro 2020) en Eŭropo. Ili i.a. gastis en la CO kaj Volontula Domo (VolDom) por esploroj pri Hodler. En marto, ankaŭ kun BEL, UEA studis sponsoradon por bicikla vojaĝado de esperantisto tra Ameriko. Kadre de MondaFest' elstaris programeroj ligitaj al Kanado kaj ankaŭ okazis la 1-a Brazila Reta Esperantista Junulara Kongreso kaj la Tago de Ameriko, la lasta regiona tago, kiun spektis pli ol 1400 homoj en UEAviva, dum pli ol sep horoj. Lernintoj de la kurso por hispanparolantoj sukcesis prezenti elstarajn erojn.




### Azio-Oceanio

La Komisiono de Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM) subtenis la 1-a Filipinan Junularan Kongreson de Esperanto. Pro evoluo de la koronvirusa malsano, D. Charters speciale mesaĝis al la ĉina esperantistaro bondezire por la sano kaj prevento de la epidemio. UEA kunlaboris kun Japana E-Instituto por diskonigo de ĝia Koresponda Servo kaj de la *Revuo Orienta*, kun interkonsento pri UEA-rilata enhavo. Estis speciala atento al la datreveno de la Maĉida Esperanto-Klubo en Tokio, kunlabore kun la rubriko *Monda Kulturo* de la *reta Revuo Esperanto*. La Tago de Azio kaj Oceanio (TAO) estis la unua virtuala kunsido de regiona komisiono en MondaFest', okazinta en junio, plenumita per unuhoraj babiladoj antaŭ kaj post la duhora ĉefa programo. Grava rikolto en TAO estis junulara forumo de 8 landaj gejunuloj,




kiu celas fondi junularan komunumon inter si. El TAO rezultis bela 62-paĝa bitversia programlibreto. Aliaj atentindaj agadoj kaj eventoj estis: Aŭstralia kaj Nov-Zelanda E-Kongreso ĉeeste (januaro 2020); la 7-a Irana Esperanto-Kongreso (kun intensa aktiviĝo de IrEA per Zoom favore al la tuta movado tra la jaro); 108-a Japana E-Kongreso, hibrida, kaj elekto de nova prezidanto de JEI; 52-a Korea Kongreso, kun la 100-jara Jubileo de fondo de Korea E-Asocio; 2-a E-Forumo inter Ŝanhajo kaj Seulo; 43-a Jara Kongreso en Pakistano; simpozioj de Filipina E-Junularo, kadre de TEJO kaj KAOEM, kaj ilia informagado per Fejsbuko; AMO-Seminarioj en Nov-Zelando, Irano kaj Ĉinio; Malfermo de APRA, E-kunvenejo en Hanojo, inter aliaj.

### Afriko




La Afrika Komisiono, sub kunordigo de F. Hounsounou, kolektis jarajn raportojn de LA-oj, kunlaboris por pli- aŭ re-fortigi la movadon en specifaj landoj kun varbado por reta kaj perkoresponda kursoj kaj esploris eblon okazigi UK-on en Afriko. UEA mesaĝis la 25-an de majo okaze de la Tago de Afriko, kunlabore kun la Afrika Komisiono. Kadre de MondaFest', la Tago de Afriko okazis la 23-an de aŭgusto, kun partopreno de afrikanoj kaj ne-afrikanoj. Pli ol 700 homoj spektis ĝin en UEAviva. Aparte grava al Afriko estis la okazigo de retaj eventoj, kio kontribuis al la inkluzivigo de multaj afrikanoj en la movado kaj en la ĉiutaga vivo de Esperantujo. Rimarkeblis tamen, ke aliro al la interreto estas defio, kiun la movado devas venki komune, favore al afrikaj samideanoj.

### Eŭropo




En marto D. Charters mesaĝis al kroatoj post tertremo en Zagrebo. Okazis esploro pri la situacio de la movado en Sanmarino. UEA mesaĝis okaze de la Eŭropa Tago, dum kiu oni festis ankaŭ la 70-jariĝon de la Deklaro de Schuman. Du el la dek AMO-seminarioj temis rekte pri Eŭropo – tiuj en Pollando kaj Norvegio. Kadre de MondaFest' okazis la Tago de Eŭropo, spektita en UEAviva de pli ol 1100 homoj, kaj la Gustumado de la Itala Kongreso.

### MONA

Okazis la 4-an de julio kadre de MondaFest' la virtuala MONA-Tago



(MONAT), kun 5-hora programo, kiun sekvis en la reto ĉ. 1800 homoj, videbla en UEAviva en 4 partoj.

**Filmkonkurso Mia Asocio, Mia Urbo:** Ĝis la jarfino de 2019 la konkurso sukcesis kolekti 35 filmojn (inkluzive 11 filmetojn fare de ĈRI) pri 30 urboj kaj asocioj en 15 landoj, en kvin kontinentoj. UEA disdonis premiojn por kvin filmoj kaj ok honorajn menciojn kaj subvenciojn al la 10 unue aliĝintaj filmoj. La unuaj tri premioj de la konkurso estis aljuĝitaj al "Minga Guazú", de A. Mendieta (Paragvajo); "Atlanto, Georgio", de A. Miller (Usono); kaj "Taŝkento", de G. Mirzo (Uzbekio). Ĉiuj kontribuoj estas ĉe UEAviva.




**Ĝemelaj Urboj:** Ekde julio 2020, okazis virtuale 5 babilrondoj inter Parizo kaj Romo. Oni parolis pri diversaj temoj en amika etoso: kuirarto, hejmbestoj, unuiĝo, muziko, vojaĝoj. La babilrondoj estas parto de projekto, kiu inkluzivas korespondan servon kaj komunajn retajn kursojn.

**Esperanto-Centroj:** Esperanto-Centroj estis la centra temo de la virtuala AMO-68, dum kiu pluraj centroj sin prezentis. M. Grosjean tiam menciis projekton de nova retejo, starigata de Gobi Parfait Abyssinie Ahonon. La projekto estis pli detale prezentita dum 2 virtualaj kunvenoj, en novembro kaj decembro.

**Faka kaj scienca agado:** En marto ekaperis la rubriko de RE "Fake, Science kaj Profesie tra la mondo", redaktita de A. Wandel, estrarano de UEA pri Scienca kaj Faka Agado. Prezentiĝis en la nova rubriko 7 Fakaj Asocioj (FA): teamantoj (TEO), medicinistoj (UMEA), sciencistoj (ISAE), skoltoj (SEL), filatelistoj/kolektistoj (ELF-AREK), biciklistoj (BEMI) kaj ateistoj (ATEO); kaj aperis pluraj sciencrilataj artikoloj (i.a. pri la koronviruso, pri la nobelpremioj kaj pri la Granda Konjunkcio fine de 2020). Kadre de VK okazis vigla Faka Forumo, en kiu prezentiĝis pli ol 20 FA-oj. UEA laboras kun 6 FA-oj Aliĝintaj (IFEF, IKEF, ILEI, ISAE, LIBE, UMEA) kaj 25 Kunlaborantaj. TEJO estas la junulara sekcio. Okazis laboroj pri (re)fortigo de malfortaj aŭ neaktivaj FA-oj kaj subskribo de kunlaborkontraktoj kun 2 FA-oj: Teamanta Esperantista Organizo (TEO) kaj Monda Spiritisma Asocio (MSA). UEA dissendis Gazetarajn Komunikojn kunlabore aŭ pri kelkaj FA-oj: TEO, TADEN, BEMI, AVE.

La 73-a sesio de Internacia Kongresa Universitato (IKU) okazis kadre de VK kun sep prelegoj. Du el ili ankaŭ estis kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kun ekzamenoj kaj disdono de 22 AIS-diplomoj. Krome okazis 4 prelegoj kadre de la Scienca Kafejo. Kunordigis la sesion A. Wandel kiel IKU-sekretario kaj G. Greatrex kiel rektoro. Dum Scienca Forumo okazis resumoj de la AIS-kursoj kaj prezentadoj pri ISAE kaj AIS. La IKU-libro aperis rete kaj dum du semajnoj estis 2500-foje elŝutita. En la IKU-paĝo de UEA aldoniĝis ankaŭ la IKU-libroj de 2018 (Lisbono) kaj 2019 (Lahtio).

UEA fariĝis ĉefa partnero de la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST), la plej grava memstara evento pri uzo de Esperanto por sciencaj kaj fakaj celoj, kiu okazis virtuale en oktobro kun pli ol 200 partoprenantoj. La TEJO-komisiito pri scienca agado Snehaja Venkatesh iniciatis serion de sciencaj virtualaj diskutoj pri scienco (fine de 2020 okazis tri, pri kemio, fiziko kaj astronomio) kaj eldonis du videojn pri junaj esperantistoj-sciencistoj (la duan kunlabore kun UEA).

**Virtuala Movada Foiro:** Lige kun la VK, okazis la Virtuala Movada Foiro (ViMF), kunordigita de A. Löwenstein, en kiu prezentiĝis ĉ. 50 Esperanto-grupoj, inter ili 10 Landaj Asocioj/Sekcioj: Filipinoj (junularo, FEJ), Nederlando (EN), Irano (IrEA), Germanio (GEA), Vjetnamio (VEA), Brazilo (BEL kaj BEJO), Kroatio (KEL kaj KEU) kaj Rusio (REU); kaj almenaŭ 23 FA-oj: ASISTI, ATEO, AVE, BEL, BEMI, EDE, Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, E@I, ELF-AREK, HIK, IFEF, IKUE, ILEI, INA, KES, MEL, MSA, Oomoto, TAKE, TEĴA, TEO, TEVA kaj UMEA. Krom tio 22 grupoj sendis videon al la Galerio de ViMF ĉe UEAviva.

**Kultura Agado:** En 2020 la Estraro rezignis alvoki por Biblioteka Apogo Bachrich, pro fermo de bibliotekoj kaj neplena funkciado de poŝtaj servoj. Sed agadoj kulturcelaj estis aparte abundaj. Kun BEL UEA kunordigis parolon en Esperanto en la usona filmo *A Machine to Live In*, laŭ invito de la perua-usona produktisto Sebastian Alvarez (voĉparolis la brazilanino M. Marino), pro kio UEA kaj BEL aperas en la agnoskoj de la filmo. Sendube tamen la Kanada Virtuala Kinejo estis la plej abunda iniciato de la jaro pri kinarto. Subtene de Vinilkosmo, partnero de MondaFest', praktike ĉiu kongreseca reta evento kalkulis je prezentado de esperantistaj artistoj. En la 11-a de julio UEA lanĉis "Omaĝe al Júlia Sigmond: 90", naskiĝtago de la verkistino forpasinta en marto, en kiu S. Spanò voĉlegis rakontojn de la libro *90*. Ankaŭ sub kunordigo de S. Spanò, kunlabore kun Akademio Literatura de Esperanto (ALE), dum MondaFest' kaj la VK okazis pli ol 20 aŭtoraj momentoj kaj prezentoj de libroj fare de eldonejoj. Sukcese okazis la Belartaj Konkursoj de UEA, kies pre-




miceremonio elsendita de UEAviva la 6-an de septembro estis kulmina momento de la plej klasika manifestiĝo de la Esperanta kulturo. La komisionon pri la konkurso konsistigis M. Fernández kiel prezidanto kaj M. Gutiérrez Adúriz kiel sekretario. La konkurson partoprenis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko. Kadre de la ceremonio Fernández anoncis baldaŭan

aperon de la *Antologio de Mikronoveloj* partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj, kiuj fariĝis 70-jaraj en 2020. Fine de MondaFest' okazis oficiala lanĉo de la Interkultura Novelo-Konkurso (INK), de ALE, aŭspiciata de UEA. UEA disvastigis tra sociaj retoj la specialajn ofertojn (Libro de la Monato), kunlabore kun la oficisto I. Oneț, kun la dumviva membro de UEA A. Ruysschaert kaj kun la *reta Revuo Esperanto*.

## Agadkampo 4: Kunordigo

**Administrado:**
Dungitoj de UEA estis M. Schäffer (Ĝenerala Direktoro), C. Magalhães (Kongresa Fako), I. Oneţ (Libroservo), S. Starčević (kontado; ĝis septembro; emeritiĝis) kaj R. Schmeits (kontado; ekde julio). Entute temis pri 3,22 EPS (ekvivalentoj de plentempaj salajratoj). Volontuloj (UEA, TEJO) kaj eksteraj laborfortoj (TEJO: S. Balouchi) multe helpis. Volontule laboris M. Martínez (sekretario, VK), R. Moerbeek (provlegado, biblioteko), P. Zapelli (datumbazo, administra konsilado), A. Grigorjevskij (retejoj), A. Adjévi (revuoj, diversaj), Léon Kamenický (financoj), L. Obando (voĉlegado, diversaj). Ankaŭ helpis diversaj TEJO-volontuloj en la plej diversaj laboroj.



**Komitato:**
Ĝenerala Kunveno okazis tra 5 kunsidoj rete: 3 dum aŭgusto, unu komence de septembro kaj unu en oktobro. Okazis 6 voĉdonoj eksterkunside, rete: pri estonteco de la retlisto Komitato-de-UEA (decido transiri al *groups.io*), pri kontrakto inter TEO kaj UEA, pri amendo al la Regularo por interreta voĉdonado (por jure validigi la decidojn farotajn dum reta kuveno), pri aprobo de la Rezolucio de MondaFest' kaj jarfine pri aprobo de la buĝeto 2021 kaj starigo de rezervo por transiro.

**Estraro:**
La Estraro regule kunsidis rete dufoje monate, aldone al kunsidoj por trakti specifajn temojn kaj laŭteamaj kunsidoj, kiel ekz. la organizteamo de MondaFest'/VK kaj kunsidoj kun la Komisiono pri Financoj. Entute okazis 23 plenaj estrarkunsidoj kaj pli ol 15 kromaj kunsidoj. En aŭgusto okazis 4 retkunsidoj kun la membraro kiel unua paŝo en la realigo de nova Strategia Plano, kiu kompletiĝos dum la jaro 2021. La Estraro prizorgis la nomumon de la nova estraro de Institucio Hodler '68 kaj alvokis por oficiala kontrevizorado, kun ekrealigo por 2021. Kun la Komisiono pri Financoj ĝi studis la kreon de la iniciato "Rondo 1908", propono por testamenta programo por UEA.

**Komisionanoj kaj komisiitoj:**
Fortigas la laboron pluraj sindonemaj komisionanoj kaj komisiitoj, kelkaj menciitaj tra la raporto, kiuj helpas antaŭenigi la celojn de UEA. Koran dankon al ĉiuj!

**Membraro:**
En 2020 UEA havis 4294 individuajn membrojn, 131 pli ol en 2019. La kreskon kaŭzis VK kaj la kurso por hispanparolantoj (ĉ. 120 personoj aliĝis pro ĝi).

**Financoj:**
La financa evoluo estis surprize bona, kun pluso. Enspezoj (antaŭ kreo de rezervoj) superis elspezojn je 42 238,35 €. La buĝeto antaŭvidis deficiton de 43 290 € (antaŭ kreo de rezervoj). La bona rezulto estas ĉefe pro tri kaŭzoj: redukto de kostoj pro salajroj, multaj donacoj pro solidaro kaj fido de la membroj (kun rekordo de 30 097 € por la ĝenerala kaso, ĉefe pro la VK kaj Alianco 365) kaj akiro de subvencio de la nederlanda ŝtato, kadre de speciala programo por organizaĵoj kaj entreprenoj suferintaj enspezo-perdon dum 2020 pro la pandemio. De tio UEA ricevis 29 486 €.

La Komisiono pri Financoj faris plurajn gravajn rekomendojn, laŭ kiuj la Estraro verkis raporton prezentotan al la Komitato. La ĉefaj punktoj estis: 1) esplori ĉu pro la vivkostoj parto aŭ la tuto de la laborfortoj estu en alia loko aŭ en diversaj lokoj; 2) celi administran modernigon, specife de la sistemo de librotenado kaj datumtraktado (*AKSO.org*); 3) ekzameni la plej efikan sidejon por UEA kaj vendon aŭ ludonadon de parto aŭ la tuto de la nuna CO; 4) konsideri transdonon de la arĥivo al IEMW kaj serĉi pli bonan konservejon por la Biblioteko H. Hodler; 5) esplori la eblan kostredukton, kiu rezultus de movo de la Libroservo al alia loko ekster Nederlando; 6) krei investopolitikon kaj gvidliniojn pri longdaŭra investado kaj kontrolo fare de financaj profesiuloj; 7) starigi sistemon de profesia subvencipetado por helpi malpliigi la deficiton kaj servi aliajn asociojn; 8) labori kun kreemo, imagkapablo kaj adaptiĝemo al la nunaj kaj estontaj cirkonstancoj de la monda situacio. Pri la 7-a rekomendo, post aprobo de la Komitato, UEA kontraktis kun Kosmo Strategio por subteno pri subvencipetaj iniciatoj. Pri la aliaj rekomendoj, la Estraro komencis esplorojn.

**Servoj kaj komunikado:**
*Esperanto*: akurate aperis 11 numeroj per diligenta laboro de la redaktoroj D. Ŝevĉenko kaj A. Striganova. Voĉlegadon (*uea.org/revuoj/sono*) prizorgis L. Obando, kiu nome de UEA ankaŭ prizorgas voĉlegadon por *Monato*. *Kontakto*: aperis 6 numeroj diligente redaktitaj de R. Pavinski. Okazis klopodoj altigi la abonnombron por *Kontakto*: specifaj programeroj kadre



de MondaFest', reklamado en sociaj retoj kaj varbado al TEJO (junaj membroj kaj patronoj). Krome funkciis aliaj kanaloj: Gazetaraj Komunikoj; EKO-j (*Aktivulo.net*); retlistoj; sociaj retoj. La laboroj pri *AKSO.org* (Administra Komuna Sistemo Organiza), en kunlaboro laŭ subskribita interkonsento kun TEJO, bedaŭrinde malfruiĝis, kio ne ebligis lanĉon de la sistemo (inkluzive de novaj retejoj de UEA kaj TEJO) en 2020. Sed oni sukcesis ĝin evoluigi por ebligi testadon komence de 2021 antaŭ publika lanĉo (la malfruo ne kaŭzis novajn elspezojn al UEA).

**Sociaj retoj:** UEA sukcese tenis spacojn en sociaj retoj, ĉefe Facebook (paĝo kaj grupo), Twitter (helpe de J. S. Quintero Santacruz), YouTube, Instagram kaj Telegram (grupo kaj kanalo). Rimarkindas revivigo, fare de L. Obando kaj F. Maia Jr., de UEAviva, kiu superis la nombron de 2000 abonantoj kaj de 4000 horoj da spektado, ebligante al la kanalo ekenspezi per reklamoj (kvankam ankoraŭ modeste). Grava atingo estis ankaŭ la estiĝo de la paĝo de Fonduso Instigo ĉe Liberapay, kiu helpas teni la laborojn i.a. de *EventaServo.org*. Pro tio Y. Nevelsteen estis nomumita komisiito pri Reta Agado, helpata de F. Ŝajani kaj R. van der Vliet. Por Eventa Servo S. MacGill kreis gvidilon por novuloj.




## Konkludo

Malgraŭ la defioj, 2020 estis sukcesa jaro por la Asocio. Elstaraj atingoj okazis pro mondskala kunlaborado. La laboroj en 2021 devas speguli tiun spiriton kiel esencan trajton de tio, kio estas kaj kion faras UEA.

## 10 ĉefaj atingoj en 2020

**1**
La filmkonkurso "Mia Asocio, mia urbo" kaj revivigo de UEAviva

**2**
Unua virtuala Malferma Tago de UEA kaj TEJO, kun tre internacia partoprenantaro

**3**
La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020)

**4**
La Saluto de UN dum la inaŭguro de MondaFest'

**5**
La Virtualaj Regionaj Tagoj de la 5 kontinentoj

**6**
La Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) kaj la projekto Viva VK en UEAviva

**7**
Akcepto de du novaj kunlaborantaj Fakaj Asocioj (TEO kaj MSA), post plurjara paŭzo tiurilate

**8**
Eldono de la Gvidlibro pri la 17 Daŭripovaj Celoj, de la libro Esperanto-ĉina *De ideoj al agoj: 70 jaroj de Unesko* kaj de la IKU-libro, unuafoje virtuale kaj rekorde elŝutita

**9**
Premiceremonia festo de la Belartaj Konkursoj

**10**
Vicprezidanto de UEA F. Maia Jr elektita kiel Esperantisto de la Jaro

## 5 grandaj defioj por 2021

**1**
Denove organizi la Virtualan Kongreson

**2**
Daŭrigi la financan resanigon de UEA, i.a. per la rekomendoj de la Komisiono pri Financoj aprobitaj de la Komitato

**3**
Proponi novan Strategian Laborplanon

**4**
Publikigi la renovigitan administran sistemon AKSO

**5**
Plu kreskigi la membronombron, kun atento pri junuloj, virinoj kaj abonantoj

## Financoj

La financa raporto kun la rezulto / bilanco aperos en la sekva (juli-aŭgusta) numero de la Revuo *Esperanto*.
Samtempe ĝi aperos en la teko: *https://uea.org/teko*

